


# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 290 (57) - KVINA EPOKO

SEPTEMBRO 1994



- Kontraŭ-rasisma klerigado
- Babele babili
- Ŭojvodina hungaro ce ni
- Katalunoj en Hungario
- Internaciaj Floraj Ludoj renovigas
- Kataluna Antologio gisdatigos
- La Papo esperantumas
- Agnosko de lingvo-unueco

ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO  KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)  
Apartat/Poŝtkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33, (93)710.96.36 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 16a kaj 20a h.). FAX (93)727.13.51, Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.  
KOTIZOJ POR LA JARO 1994: Individua Abonanta Membro 3.000 p-toj; Individua Subtenanta Membro 6.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 60.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.000 p-toj. Juna Membro 2.500 p-toj.  
BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.  
PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; Vicprezidanto: Maria Nuez-Garcés; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig; Vicsekretario: Hektor Alos; Kasisto: Lluís Armadans;  
Komitatanoj: Miguel Ángel Altuna, Bartomeu Costa, Joan R. Guiñón, Ĝirona Espero, Francesc Ibáñez, Joan Marimon, Josep Ma. Milla.  
KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Ricard Jordana, Òscar Puig.  
KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriòl Macip, Llibert Puig.  
La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.  
KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO: Apartat 32 318, 08080 Barcelona.  
FREQUËNCIES: Apartat 1 163, 08300 Mataró (Maresme).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

*In Memoriam: Dolors Andreu i Massó*

El 20 de marĉ, la senjora Dolors Andreu i Massó moria als seus 97 anys d'edat. La recordem com una ciutadana normal, afable, tolerant, activa, però sobretot perseverant. Era mestra, profesio que exerci només abans de la guerra del 1936-39; després treballà d'administrativa a la Pirelli.

Durant els ŭltims 25 anys va ser, principalemte, esperantista. Va comenĉar a studiari l'esperanto l'any 1927, suposem que a l'Ateneu Vilanoví, on l'ensenyaven les germanes Eulàlia i Teresa Rossell, també mestres, i el feroviari Jaume Fort.

Segons el cronista i promotor de la "segona epoca de l'esperanto a Vilanova i la Geltrú", l'escolapi Josep Maria Claramunt, Dolors Andreu tornà de forma activa a l'esperanto el marĉ del 1968. Des del 1970, quan el pare Claramunt va ser destinat a rector de les escoles pies de Calella, la senjora Dolors es va fer càrrec del Grup d'Esperanto, seĝu la tasca de cronista d'en Claramunt i preeminente durante els darrers 25 anys "portà la torxa" de l'esperanto a la nostra vila.

La torxa de la llengua transnacional, concisa, amb precisó, fàcil d'aprendre. Idioma de contactes directes

**T**ri elstarajn aranĝojn organizas KEA kaj KEJ ĝis la fino de la jaro. Tia estas ĉe ni la tradicio, helpita de la feri-kalendaro, kiu igas, ke esperanto-renkontigoj amasigas en la lasta trimestre post tro longa manko. Aparte elstarindas la fortostreĉa 4a KEJ-Diskutkunveno, kiu festas la 15-jariĝon de la junulara esperantomovado en Katalunio. Neniam KEJ organizis tiel grandan aranĝon, sed la sukceso de la antaŭaj seminarioj certigas ĝian altan nivelon kaj plaĉan etoson.

Siaflanke KEA, unuafoje ekde sia fondiĝo, ne organizos ĉi-jare la Internaciajn Florajn Ludojn. Malgraŭ la laboro de la prezidanto kaj sekretario de IFL, Gabriel Mora i Arana, respektive Joan Ramon Guiñón, de la tuta Konservantaro, la estraro de KEA kaj donacemaj asocianoj, bedaŭrinde alvenadis dum la lastaj jaroj malsufiĉaj konkursaĵoj. Tial ĉi-jare oni decidis ne okazigi nian beletran feston. Iel anstataŭe, samkiel lastatempe en multaj kulturaj asocioj, KEA organizas tre altiran kontraŭrasisman seminarion, kiun gvidos du bonegaj fakulinoj de Monda Kunagado.

Al tio aldonendas publika prelegaro pri la situacio de hungaroj en Vojvodino kaj la tradiciaj Zamenhof-festoj, kiuj okazos decembre tra la lando. Ni esperas, ke almenaŭ unu el tiuj eblecoj logos vin.

i sobretot sense discriminació, amb persones i famílies de cultura diferent, sense imposició de la llengua d'un poble a un altre poble: "Cada poble amb la seva llengua i l'esperanto per a tots".

Tot el que ens heu llegat, Dolors, quedarà i farem els possibles per augmentar-ho i donar-ho a conèixer el més amplemte possible, per contribuir a la realitació d'una comunitat transnacional, dins el respecte de tota identitat.

Gràcies, senjora Dolors, pel vostre exemple de perseverança i pels vostres ensenyaments. La vostra tasca ha estat transvital; perdurarà.

Grup Esperanto Vilanova

**Sukcesa ekskurso al Tortosa**

La kataluna esperantista movado ne estas tiom vigla kiom oni deziras. Kiu konas magian rimedaron kontraŭ ĝia malforto? Tamen ero da rimedo jam funkcias kun plaĉa efiko. Vetur-ekskursoj de nia komunumo, ligitaj al esperantaj okazaĵoj, montriĝadis bonaj momentoj. Tiel estis dum la kongreso en Alcúdia kaj dum la pasinta monato junio denove prezentigis la afero.

Komforta aŭtobuso, agrabla etoso, ĉiufoje komenco je la ĝusta horo, kontentiga loĝejo bonpreza... Oni vojaĝis al la urbo Tortosa kaj delto de la rivero Ebro. Elstaras pro sia ĉarmo boatveturo laŭ la rivero ĝis la maro mem kaj reveno. La duan tagon estis afabla akcepto en la tortoza urbodomo kaj sekva irado al tute nova kvartalo de la urbo por inaŭguri straton kun la nomo Zamenhof.



Alia loga ebleco estas, ke esperanto fariĝu komunikilo por diversaj interesaj temoj kaj ne nur por si

mem. Tio dependas de la esperantanoj.

Ramon Perera kaj Neus Moly

**KEA kaj KEJ renkontiĝas**

**KEA-seminario kontraŭ rasismo**

La 26an kaj 27an de novembro okazos en Club d'Amics de la Unesco de Barcelono kontraŭrasisma seminario organizita de KEA. Elstaraj gastoj de nia aranĝo estos Encarna Teruel Rodríguez, psikologo, kaj Elisabeth Schwarzer, etnologo kaj kunordiganto pri kontraŭrasisma klerigado de Mondá Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo.

Dum la aranĝo okazos la jara asembleo de nia asocio.

**Jubilea KEJ-aranĝo**

KEJ festos sian 15-jariĝon dum la 4a Diskutkunveno okazonta de la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro apud Sant Celoni (Vallès Oriental). La aranĝo titoliĝas ĉi-jare *Babele babili* kaj en ĝi oni diskutos pri lingvaj aferoj: estas anoncigitaj prelegoj pri *Historio de skribo* (J. M. Milla), *Morto de lingvoj* (H. Alos), *La araba* (C. Vela) kaj *La okcitana* (F. Macip)... plus kelkaj surprizetoj. Aldone al tiu ĉi serioza parto, oni planas fido-ludojn, du koncertojn, filmo-spektadon,

dum festeta vespermanĝo celas kunigi iamajn kaj nunajn KEJ-aktivulojn. Centro de Esperanto Sabadell denove organizos dum la aranĝo sian tradiciajn kaŝtanfeston kaj fungoĉasadon. Partoprenantoj bonvolu frue anonci sin!

**Vojvodina prelegaro**

István Kabók, hungara historiisto el Vojvodino (Serbio), rondvojaĝos tra nia lando parolante pri *Madjaroj*

en Vojvodino: historio, nuno kaj perspektivoj. La datoj de liaj publikaj prelegoj estas la jenaj:

- Reus: 19an de oktobro
- Girona: 21an de oktobro
- Barcelona: 25an de oktobro
- Vilanova i la Geltrú: 27an de oktobro

La aranĝojn kunorganizas Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj kaj Kataluna Esperanto-Asocio.

**4a KEJ-diskutkunveno: BABELE BABILI**

*Bunte, amuze, fake pri lingvoj*

**29a de oktobro - 1a de novembro SANT CELONI (Vallès Oriental)**

## Sabadell viglegas

Centro de Esperanto Sabadell (CES) iniciatis kulturajn ekskursojn por vigligi sian agadon. La unua okazis la 22an de januaro al la Muzeo de Esperanto en Sant Pau d'Ordal, kiu en ĝi kunvojaĝis ankaŭ geesperantistoj el Barcelono kaj Mataró. Survoje oni vizitis la Vin-muzeon en Vilafranca del Penedès.

La 14an de majo CES organizis viziton al la Paper-muzeo en Capellades kaj al la restadejo de la asocio Enllaç en Guardiola de Font-rubí, kie la partoprenantoj tagmanĝis en tre simpata etoso. Enllaç eldonas la alternativan revuon *Via Fora*, en kiu de antaŭ pluraj jaroj la enhav-tabelo kaj resumoj de ĉiuj artikoloj aperas en la kataluna, angla kaj esperanto. (Interesiĝantoj pri tiu revuo povas ricevi senpagan provok-

zempleron al KEA.)

CES tre aktive partoprenis ankaŭ la Grandan Feston de sia kvartalo, Creu Alta, okazintan inter la 20a kaj 23 de majo. Ĝi prezentis ekspozicion, starigis surstratan informejon, publikigis artikolon en la speciala fest-jurnalo kaj disponigis sian sidejon por prezenti fotoekspozicion pri la loka malnova futbalejo. Temis pri tre interesa kunlabor-sperto kun la kvartalaj kulturagantoj.

(el Llibert Puig)

## Saluto de ministro

Joan Guitart i Adell, katalunia kultur-ministro, sendis salutmesaĝon al la Universala Kongreso en Seulo:

*Catalunya s'ha distingit sempre per ser un país de taranà volgudament obert i receptiu per a les diferents cultures, i ha estat també un lloc d'acollida per a l'Esperanto, una llengua de comunicació i de diàleg per a tots els pobles del món, i que ha esdevingut un mitjà per donar a conèixer internacionalment la nostra identitat i cultura.*

*Històricament, la llengua d'Esperanto va començar a ser emprada i estudiada entre nosaltres des de principis del segle xx, a redòs de l'empenta que hi va donar el fet que el 1909 se celebrés a Barcelona el 5è Congrès Internacional d'Esperanto, que va comptar amb la significativa presència del seu autor, el Dr. Zamenhof.*

*La notable incidència que va tenir després l'Esperanto es pot observar en la celebració el 1910, a Sabadell, del 1r Congrès Català d'Esperanto i la instauració dels Jocs Florals Internacionals.*


*Com a Conseller de Cultura, em plau adreçar aquesta salutació a l'Associació Universal d'Esperanto i a tots els participants en el 79è Congrès Universal d'Esperanto que té lloc aquest juliol a Seül, que representa una important aportació a la sempre necessària amistat entre els pobles i a la pau en el món.*

## Saluto al la HEF-Kongreso

Kataluna Esperanto-Asocio sendis bondeziran telegramon al la Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio, okazinta julie en Málaga. Ĝi estis laŭtleĝita dum la solena kongresfermo kaj varme aplaŭdita la partoprenantoj.

## Eŭropa Esperanto-Festivalo

Llibert Puig, ĝenerala sekretario de KEA, estis invitita partopreni la Eŭropan Esperanto-Festivalon, okazintan de la 9a ĝis la 15a de julio en Hungario. Kadre de tiu ĉi aranĝo oni organizis la 2an Konferencon pri lingvouzo de minoritatoj, en kiu okazis pli ol 20 prelegoj. En du sesioj Llibert Puig parolis pri la kataluna kaj ceteraj malplimultaj lingvoj en la hispana ŝtato kaj prezentis etan ekspozicion kaj videofilmon pri katalunaĵoj. La materialojn disponigis Generalitat de Catalunya. Ankoraŭfoje li devis rebarti la aserton de Augusto Casquero, ke la valencia kaj kataluna estas apartaj lingvoj kaj prezenti la dokumenton subskribitan de diversaj membroj de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo, kiu dementas tion kaj kvalifikas kiel aberacian ĉiun provon atenci kontraŭ la lingva unueco kataluna-valencia (vidu *Kataluna Esperantisto* n-ro 286-287). Nia reprezentanto aktive intervenis ankaŭ en la Eŭropa Esperanto-Forumo, kie oni diskutis primovadajn temojn.



Llibert Puig prelegis en Hungario



CES vizitas la Esperanto-muzeon

Tiu agado meritis artikolon en *Diari de Sabadell* kaj intervjuo en *Catalunya Ràdio*.

### TEJO/KER-seminario

De la 1a ĝis la 8a de majo, niaj junaj aktivuloj Pako Belmonte kaj Felip Artero partoprenis TEJO/KER-seminaron en Eŭropa Junulara Centro (Strasburgo) pri la temo *Trans la limoj de Eŭropo - la eŭropa kontribuo en la hodiaŭa modo*. En tiu kadro Pako Belmonte prelegis pri eŭropcentrismo en kartografio. Post la seminario, Felip Artero laboris unu monaton kiel volontulo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, kie li ĉefe enpakis librojn por la Seula libroservo.

### Intervjuoj en radio

La 8an de julio, la fama ĵurnalistino Neus Bonet intervjuis Llibert Puig, ĝenerala sekretario de KEA, en sia posttagmeza programo *L'aparador ĉe Catalunya Ràdio*. La demandoj ĉefe rilatis al esperanto ĝenerale kaj, pli precize, al la lasta aranĝo de KEA en Tortosa. Kelkaj aŭskultantoj telefone demandis, i.a. membro de la rokgrupo Pixamadúrries, kiu aperigis kelkajn kantojn en esperanto en sia lasta kasedo.

La 28an de julio vespere, estis Sílvia Tarragona, kiu en la samradia programo *Sota la palmera*, intervjuis Llibert Puig pri lia partopreno en la Eŭropa Esperanto-Festivalo kaj Pako Belmonte pri la lasta TEJO-seminario en Strasburgo.

Krome *Diari de Tarragona* aperigis longan informon pri la KEA-renkontiĝo en Tortosa.

### IFL serĉas renoviĝon

Beletraj premioj delonge krizas kaj Esperantio ne esceptas pri tio. Ekzemplo estas la Belartaj Konkursoj de UEA, kiuj ĉi-jare aljuĝis neniun poezian premion nek la Unuan Premion en la proza branĉo. Simile oka-

zis ĉe la Internaciaj Floraj Ludoj, ĉe kiu dum la lastaj jaroj estis konstatabla malmultiĝo de konkursaĵoj. La krizo evidentigis pasintjare, kiam unuafoje en la 33 okazigoj de la konkurso la ĵurio decidis ne aljuĝi la Naturan Rozon malgraŭ grava monpremio. Tial, en komuna kunveno de la estraro de Kataluna Esperanto-Asocio kaj la Konservantaro de IFL, oni decidis starigi provizoran komisionon, sub la kunordigo de Abel Montagut, taskitan elpensi proponojn por renovigi la beletran konkurson de KEA. Krom tio, la kunveno decidis provizore ne okazigi la Florajn Ludojn dum la kuranta jaro 1994 pro la antaŭvidebla manko de partoprenantoj.

KEA volas danki la mon-donacintojn al la Fondaĵo Floraj Ludoj, kiuj per siaj kontribuoj klopodis firmigian konkurson.

### Francoj kongresas en Okcitanio


Kiel ĉiu nacia kongreso de esperanto ĉi tiu de Agda, de la 11a ĝis la 15a de majo, enhavis pli-malpli la kutimajn aranĝojn: intermiksiĝis interkona vespero, oficiala malfermo, kunsidoj, prelegoj, kulturaj vesperoj kaj ekskursoj. La plej multaj kongresanoj loĝis en "fericentro" je 2 km. de Agda, tiel ke oni tie organizis la interkonan kaj adiaŭan vesperojn kaj startigis ekskursojn. En la interkona vespero oni prezentis vidbendojn pri la kongresaj ekskursoj kaj interesaj

ĉirkaŭaj lokoj. Poste la partoprenantoj gustumis diversajn kaj abundajn dolĉaĵojn kaj alkoholaĵojn. La sekvan tagon, la kongreso estis malfermita en la "festpalaco" de Agda. Ĉeestis la urbesto kaj UFE-estraranoj, kiuj bonvenigis la kongresanojn.

La kongreso estis tre altira de la turisma vidpunkto, ĉar ĉiutage eblis elekti du alternativajn ekskursojn. Jaŭde la 12an, mi partoprenis tiun de fortikaĵo "Oppidum" el Ensuruna, antikva loĝloko de antaŭ 2 500 jaroj kun arkeologia muzeo. Vendrede ni vizitis Pezenas, urbeto, kie loĝis Molière dum kelkaj jaroj; ĝi posedas ekstereordinaran doman ensemblon de la 16a ĝis 18 jarcentoj. Sabate mi elektis la "krozadon tra la kanalo de la sudo kaj la lago Thau". Dum la navigado en la kanalo, ni povis konstati la kluzan teknikon por navigi suprenmalsupren tra la riveraj kanaloj, kies navigaj retoj etendiĝas tra la tuta Francio. Dum la vojaĝo, ni tagmanĝis sursipe paeljon kun mituloj kaj salikokoj, dum ĵaztripo agrabligis la ekskurson. Trairinte la lagon Thau, ni alvenis Seton, elŝipiĝis kaj buso nin transportis al monteto, de kie videblas vasta panoramo. Poste, en la "teatro ĉe la maro", ni spektis muzikan omaĝon al la kantisto Georges Brassens bonege luditan de la grupo Esperanto Gironde.

Statistike la ĉi-jaran francan kongreson partoprenis 134 personoj. El la 12 alilandanoj, kvar estis katalunoj.

Bartomeu Costa



# Don Kihoto en Katalunio

*Ĉapitro laŭ  
la araba originalo  
de la historio  
pri Don Kihoto,  
mankanta  
en la mondefama  
versio prilaborita  
de Cervantes.*

Post plurtaga vojaĝado survoje al Barcelono, ili alvenis antaŭ la sinua kaj vastflua rivero Ebro, kaj ili devis ĝin trapasi, en vilaĝo nomata Fliŝ, per pontboato.


Antaŭ la enboatigo, dum ili atendis apud mulkondukanto, venis al ili la boatisto, kiu salutis kaj petis de ili du soldojn. Tamen Don Kihoto miris, kaj rigardis al sia ŝildisto:

"Diru al mi, Sanĉo, ĉu vi ion komprenis el la vortoj de tiu bona homo? Ĉar ŝajnas al mi, ke mi estas ensorcita, kaj eble vi povos lin kompreni, pro tio ke sur vin ne efikas magiaĵoj."

"Je la granda Ruŝ!" ekkriis Sanĉo. "Tiel same mi komprenos lin, kiel mi fariĝos Turko. Via moŝto kiu ja studis lingvojn kaj retorikon devus lin kompreni, ĉar mi mem ne havas pliajn konojn krom tiuj fontantaj el la scienco gardi anasojn kaj porkidojn kaj el la dumnokta gvatado de la steloj."

"Mi certigas vin, ho Sanĉo, ke ĉi tiu nepre estas nova lingvo aŭ, almenaŭ, nekonata sur la mondo," respondis Don Kihoto.

La boatisto, aŭdante ilin paroli en la Hispana lingvo kiun li nur duone scipovis, komprenante ke temas pri fremduloj, montris per tri fingroj (ĉar tio estis la kalkulo laŭ 'maravedoj' anstataŭ la Kataluna mono) kaj signis al la burso de la ŝildisto, kiu malgraŭvole liveris al li la postulitajn monerojn. Kiam estis sufiĉe da pasaĝeroj ili povis surboatigi, kaj



dum la navigado Don Kihoto faris plurajn komentariojn kaj demandojn al la akompanantoj sur la pontboato, kiuj tamen ne ricevis respondon, krom ŝultrolevoj kaj grimacaj interrigardoj, ĉar neniu regis lian lingvon.

Alveninte al la transa bordo li alparolis la ŝildiston:

"Sciu, Sanĉo, ke tiu eksterordinara okazaĵo, ke oni ne komprenas nin, sendube ŝuldiĝas al nova artifiko kaj ruzaĵo de la envia magiisto kiu daŭre staras kontraŭ mi, ĉar li celas eviti ke mi plenumu grandan faron en tiu ĉi regno per tio, ke mi ne povu informiĝi pri la bezonoj de ĝiaj loĝantoj. Sed mi asertas al vi, ke nenio obstak-

los nian bonfaradon tra la mondo, ĉu magiaĵoj, trompoj, aŭ ŝajnigoj."

Post du horoj da rajdado sur polva vojo, ili alvenis antaŭ gastejo kaj, ĉar la stomako de Sanĉo prefere ol tiu de Don Kihoto estis jam inklinata al tagmanĝo, ili decidis tie halti. Ĉe la dekstra flanko de la pordo staris alta kaj fronda pino, kaj sub ĝi du ĉaroj kaj pluraj muloj de tritikportistoj: Ili envenis sub la miranta rigardo de la ĉeestantoj kaj sidigis ĉe malplena tavolo sur la fono. Ruĝevanga gastejestro venis, kiu bonhumore ilin akceptis kaj invitis al tagmanĝo. Li konjektis, ke temas pri eksterlandanoj pro la nekutima vestaĵo de Don Kihoto kaj

pro la vizaĝaspekto de Sanĉo, kaj tial li turnis sin al ili en la miksaĵo de Hispana kaj Kataluna lingvoj, kiun li uzis ĉe tiaj okazoj. Kaj malgraŭ la surprizomontraĵoj mienoj de Don Kihoto kaj Sanĉo, ili sukcesis sufiĉe interkompreniĝi tiel, ke li alportis du kondimentitajn perdrinkojn kun olivoj, freŝa pano, kaj ruĝa vino. Dume la alitablanoj laŭte ekridis ĉe la misformitaj vortoj de la gastejestro kaj pro la strangaj reagoj de la ĵusaj alvenintoj. Pro tio Don Kihoto kaj Sanĉo, tuj kiam ili finis manĝi, senceremonie pagis kaj senadiaŭe foriris.

Jam denove sur la vojo, Don Kihoto diris:

"La misa sorĉo kiu nin ĉirkaŭombros iom post iom forsvenigas, amiko mia, ĉar antaŭe sur la pontboato neniu vorto de la pasaĝeroj kompreneblis, sed nun jam preskaŭ la duono klaris, malgraŭ tio, ke la gastejestro nur embarase kaj fuŝe parolis nian lingvon. Tial, estu certa, Sanĉo, ke post mallonge la tuta sorĉo definitive nuligis kaj la loĝantoj sur ĉi tiu tero ree kapablos sin libere esprimi sen ia supertrudo aŭ langotordo."

"Se via moŝto allasos," respondis Sanĉo, "mi opinias, ke temas pri nenia sorĉo tio, ke ni ne komprenis la boatiston aŭ la cetereajn akompanantojn kiam ni transiris la riveron, sed pti tio ke, ne sciante kielon aŭ kialon, ni elvenis el Hispanujo kaj ni troviĝas sur lando kie oni parolas malsaman lingvon kaj bonsanĉe ke via moŝto lernis plurajn, ĉar alimaniere ni ne sukcesus jam informiĝi pri la sekvenda vojo."

"Sendube vi eraras, Sanĉo," interrompis Don Kihoto. "Ĉar diru al mi: en kiu penso povas enhaviĝi, ke ni estus elirintaj eĉ unu colon el Hispanujo, sen antaŭe transnavigi iun el la maroj kiuj ĝin ĉirkaŭfermas aŭ sen transpiedi la muregojn kaj neĝojn Pireneajn?"

"Mi ne diras, mia mastro," respondis Sanĉo, "ke ni navigis tiujn marojn, kiujn via moŝto diris, tute nature, aŭ ke ni transpasis la Pireneojn piede sur la neĝo, sed tion, ke per nekonata rimedo, ĉu flugrajdante tra l' aero aŭ navigante en ŝipo aŭ boato ensorĉita, ni ĝisvenis, resume-proksimume, je kvar aŭ kvin mil mejloj for, ĝis lando kie oni parolas lingvon mal-

saman al la nia, tiel ke ni ne kapablas interkompreniĝi."

"Klare montriĝas, Sanĉo," respondis Don Kihoto rigardante lin de flanke, "ke vi ne multe kleras pri kavaliraj aventuroj, ĉar se vi estus leginta eĉ nur duonon el la libroj kiujn mi legis, vi vidus evidente kiel la migrantaj kavaliroj, kiom ajn malproksimen ili vojaĝas aŭ renkontas homojn el ajna regno aŭ nacio, ĉiam interkompreniĝas kun tiuj kiujn ili celas kaj devas favoradi. Tial, logikas aserti, aŭ male mi ne estus bona migranta kavaliro, ke tio kio okazas al ni sur ĉi tiu tero ŝuldiĝas al nenio krom al misa magiaĵo de la plenenvia sorĉisto min persekutanta. Tamen mi certigas vin, ho Sanĉo, ke malgraŭ ĉio kaj spite al ĉiuj friponoj aŭ fuŝuloj, mi ne foriros el ĉi tiu tero sen antaŭe liberigi ĝiajn loĝantojn el la jugo kiu malhelpas ilin esprimiĝi en sia propra kaj natura lingvo."

"Mi bone vidas," diris Sanĉo, "ke provi vin konvinki egalas al hakado sur malmola ligno kaj, kiam via moŝto obstinemas, ekzistas neniu elireblo krom ameni kaj meti ĉion sur la manon de Dio."

Ili pluvojis inter pinaj montoj ĝis ili venis proksime de vilaĝeto, kies turo elstaris inter ruftegmentaj domoj. Je nur kvaronhoro de l' vilaĝo ili renkontis grupon de geknaboj ludantaj sur draŝejo, kiuj, rimarkinte la du personojn, ekrigardis ilin mire sed baldaŭ decidigis postsekvi la ĉevalon de Don Kihoto kaj la azenon de Sanĉo, supozante ke temas pri amuzistoj por la ĉefa festo tiam okazanta. Unu el la knaboj ekkantis kaj la ceteraj ĥoris tradician ludokanton kun kalemuraj vortoj, fine de kiu estis kutimo sonore imitaĉi terojn.

"Aŭskultu, Sanĉo," komentis Don Kihoto, "kiajn misterajn vortojn diras kaj kiajn senkaŭzajn terojn faras ĉi tiuj geknaboj, somermeze kaj ĉiuj samtempe, kio povas ŝuldiĝi al nenio krom al tiu sorĉo, kaj pri tio klare montriĝas, ke la misa magiaĵo ankoraŭ ne solviĝis."

Tiam Sanĉo vidis puton kun apuda trogo ĉe la vojo, kaj ili decidis halti por trinkiĝi siajn bestojn, dum la geknaboj, plu kantante, preteriris ĝis la proksima vilaĝo, kie baldaŭ okazos la posttagmenzaj dancoj kaj amuzoj.

Ili iomete ripozis kaj Sanĉo prenis kolazionon. Post nelonge, Don Kihoto ekkriis:

"Atentu, Sanĉo, ĉar ĉi tie estas novaĵo, miaopine, Ĉu vi ne aŭdas murmuradon de sennombraj tamburoj kaj la krian tumulton de armeoj sange batalantaj?"

"Ĉiu ĉi svarmo kaj agito, sinjoro Don Kihoto," respondis la ŝildisto, "venas el la vilaĝo, kie laŭŝajne oni solenas grandan feston kaj ne malprudentus tien apudiĝi, ĉu ni povus elsavi birdidaĵon aŭ ian gorgan regalilon, ĉar buŝon oscendanta stomakon ne plenigas."

"Tio kion ni devas savi, Sanĉo," replikis Don Kihoto, "estas la ĉi-regnaj vilaĝanoj, ĉar tie, meze de la homoj, aperas la giganto aŭ gigantoj, kiuj sendube kulpas pri la sorĉiteco kiun la landanoj suferadas, ĉar multfoje la gigantoj estas samtempe magiistoj. Kaj la krioj kaj malordo efektive estas pro la teruro kaj hororo kiujn ili vekas. Sed nun, pro la alta volo de l' ĉieloj, alvenis la momento meti finon, fermon, kaj haltigon al tiu maljusta kaj perfida tiraneco."

Li ĝustigis sian kaskon. Petis la landon de la ŝildisto kaj spronis la ĉevalon cele al la esplanado kie oni ĵus komencis la dancojn kaj amuzojn ĉirkaŭ paro de kantongigantoj kiuj pufeveste dancis je la sono de graksalmoj kaj tamburoj. Temis pri du gigantoj, altaj je pli ol ses ulnoj, prezentantaj reĝon kaj reĝinon: du kronitaj figuroj el ligno kaj kartono, interne malplenaj, kun vestaĵoj ĝispiede, sub kiuj staris po unu viro kiu per taŭgaj ilioj kaj rimenoj portadis ilin surŝultre. Tiuj kartonfiguroj estis plej ŝatataj kiel simbolo de l' vilaĝo, kaj konsistigis unu el la plej popularaj motivoj de la festo.

Kiam la vilaĝanoj vidis la neatenditan rajdanton tiel rapide proksimiĝi, ĉiuj ekteruris kaj apartiĝis de lia vojo. La portistoj de l' gigantoj, kiuj tra aĵura truo sur la jupo povis vidi la ĉirkaŭon, ĥaste elglitis el sub la vestaĵoj por rifuĝi, ĉar la lancisto rajdis rekte kontraŭ ili, kaj lasis la figurojn starantajn meze de la ebenaĵo.

Don Kihoto ŝturmis kontraŭ la unua per la lanco flankplate apogita, bategis kontraŭ ĝia brusto kan reversis ĝin. La giganto falis sur la gi-

gantimon kaj ambaŭ ruliĝis sur la grundon kun granda bruo kaj polvolevo. Li sekve deseliĝis, elingigis sian glavon kaj fortranĉis la kapon de la gigantino, kiun li prenis je la blondaj harplektaĵoj kaj montris al la regroupiĝintaj vilaĝanoj. Al ĉi lastaj la tuto efektive ne tre plaĉis, kaj ili ek-kaptis ŝtonojn, vergojn aŭ kion ajn ĉemane, kaj ĵetadis kontraŭ la kavaliro, kiu protektis sin per la ronda ŝildo, kaj sin turnis al ili per paroloj neaŭdeblaj meze de la protesta kriego, ĝis fine li ricevis ŝtonfrapon sur la frunto, kiu faligis lin surteren. Tamen, pro la pacigaj vortoj de la pastro oni lasis lin kuŝanta, kio ne evitis, ke li ricevu plurajn piedfrapojn sur la ripoj. La vilaĝanoj forportis la difektitajn figurojn kaj ankoraŭ kun protestoj retirigis al la centra placo.

Alvenis la ŝildisto, kiu dum la tuta tempo rigardis la aferon de post la putmuro, kun sia azeno, kaj helpis

Don Kihoton ree surseliĝi, malgraŭ la humiliĝo kaj la multnombraj kontuzoj. Kaj ili ambaŭ forrajdis de l'vilaĝo.

Jam je unumejla distanco ili haltis por ripozi, kaj Don Kihoto eksuspiris:

"De bone naskitaj homoj estas danki la bonfarojn kiujn ili ricevis, kaj unu el la plej gravaj pekoj estas sendankeco. La sendankeco estas ido de l'orgojlo, kaj kiu ne dankas lian bonfartinton klare montras ke same kondutos rilate al Dio, kiu superŝutas lin senĉese per bonajoj. Tamen, amiko Sanĉo, mi firme kredas, ke tiuj vilaĝanoj pli-malpli frue rekonos sian ĵusan eraron kiam ili min atakis senpripense, kaj dankos pro l' favoro kiun mi faris al ili per la forigo de la misa sorĉo kaj de la senindulga subpremo suferitaj."

Tiam li rigardis al la malproksimo, kie elstaris sagoforma monto, kaj Don Kihoto daŭrigis:

"Ĉi tiu punkto kaj momento estas sendube la plej taŭga por proklami kaj trumpeti kiele gravas, ke sur la mondo estu migrantaj kavaliroj por reĝustigi la misfarojn kaj restarigi la malhonorojn, ĉar ĉiu povas vidi kun kia facilo kaj rapido mi plenumis kion mi promesis, liberigante ĉi tiun teron el la perversaj magiistoj kaj gigantoj kiuj, kontraŭ ĉia pravo aŭ justeco, ĝin longe tiranis kaj subjugis. Tial mi diras, ke la libereco estas unu el la plej valoraj donacoj kiujn la ĉieloj donis al la homoj, kaj mi asertas ankaŭ, ke por la libero oni devas riski sian vivon kaj, kontraŭe, la kaptiteco estas la plej granda malfeliĉo kiu povas veni al la homoj."

La foraj montoj eknebulis dum ili pludaŭrigis sian vojon.

Joŝua Al-Monmeneci  
El La Gazeto n-ro 41, junio 1992

**2a Atlantika Plonĝado**

10a - 13a de novembro  
TROIA (Portugaliao)

**Esperanto-kurso**

28a de oktobro -  
1a de novembro  
GASTEIZ (Eŭskio)

**SEMINARIO  
KONTRAŬ RASISMO**

26a - 27a de novembro

**Barcelona**



*Printempo de la lingvoj en Tolosa*

La 16an de majo, ĉe Salono Sénéchal en Tuluzo, kvindek da ĉeestantoj aŭskultis preleg-debaton organizitan de Esperanto-Kultur-Centro kaj gviditan de Hektor Alos i Font, redaktoro de revuo *Kataluna Esperantisto* kaj François Lo Jacomo, inĝeniero-lingvisto, prezidanto de Franca Esperanto-Instituto kaj membro de Akademio de Esperanto. La preleg-debato okazis kadre de la tuluza ĉiujara *Prima de las lengas* (Printempo de la lingvoj), kaj ĝia temo estis: "La rolo de regionaj lingvoj kaj la rolo de la internacia lingvo esperanto en multlingva Eŭropo".

**Por plurkultureco**

Hektor Alos parolis unua, en la kataluna lingvo kun interpreto en la francan. Li bazis sian referaĵon sur la ideo, ke lingva plureco estas riĉiga fenomeno. Li rimarkigis, ke plej multaj homoj en la mondo estas plurlingvaj, ke unulingvuloj kaj unukulturuloj estas esceptaj. Laŭ li, necesas lerni la propran lingvon -antaŭnelonga atingo de la katalunoj-, sed ankaŭ estas devo lerni tiujn de la tujaj najbaroj por kompreni ilian kulturon. Ekzemple en Katalunio, enlerneja instruado de la romaa (cigana) kaj araba kulturoj estus potenca rimedo kontraŭ rasismo.

Koncerne lingvouzadon en la Eŭropa Unio, Alos distingas du kriteriojn: efikecon, laŭ kio dezirindas ununura lingvo; kaj socian intereson, laŭ kio uzindas ĉiuj lingvoj, ankaŭ la minoritataj. La angla socie jam fakte prenis la rolon de *lingua franca*, sed devus esti eble anstataŭi ĝin per esperanto, kies avantaĝo estas neŭtraleco. Efektive, estas pli facile reformi la Eŭropan Komunumon, nur 40-jaraĝan, ol plurjarcentan ŝtaton.

Alos insistis pri la malfacileco ŝanĝi pensmanieron de unulingvaj kaj unukulturaj homoj: tio ne fareblas per dekreto. Lerni la araban kaj esperanton, li konkludas, estas revolucio.

**Kontraŭ kliŝoj**

Ekparolante, François Lo Jacomo ne hezitis surprizi, eĉ ŝoki la



ĉeestantajn esperantistojn. Ludante, laŭ propra konfeso, rolon de "advokato de diablo", li celis ekzameni kial esperanto ankoraŭ ne hodiaŭ estas grandskale disvastigita tra la mondo, kaj kiel la argumentoj de ĝiaj defendantoj profitus de reekzameno.

Lo Jacomo unuavice demandis sin, ĉu la lingvo-problemo -kiun la esperantistoj pretendas solvi- efektive ekzistas. Ĉu komunik-problemoj? Jes, sed por nur tiuj, kiuj volas komuniki. Ĉu kost-problemoj? Ili estas komparendaj kun la ricevitaj riĉaĵoj. Ĉu kompren-problemoj? Ne sufiĉas paroli saman lingvon por kompreni, eĉ se tio multe helpas: necesas anticipi la sencon, necesas voli kompreni.

Kiam temas pri la ligo inter lingvo kaj identeco, Lo Jacomo atentigas, ke ĉar unulingveco estas iom escepta (krom en la politike fortaj landoj), ne ĉiam estas simple scii, kiu estas la propra lingvo. Efektive, eblas identigi kun pluraj lingvo-komunumoj. Tiusence esperanto ne estas escepto: kiel la aliaj lingvoj, por ĝia parolantaro ĝi estas rimedo montri apartenon al komunumo, kiu estas supermetita je aliaj apartenoj.

Aliflanke, lingvo ne estas ŝtata posedaĵo, eĉ se tiu ĉi povas leĝigi por favori aŭ protekti iujn lingvojn

(la leĝo Toubon en Francio estas aktuala ekzemplo).


Ĉu esperanto estas solvo al specifaj problemoj? Ĉu ĝi estas varo kiel telefono (je kiu fruepoke oni ne kredis), aŭ kiel anglalingvaj kursoj vendataj kiel varoj? Ĉu ĝi estas nur lingvo, pri kiu lingvistiko devus interesi? Finfine, ĉu esperanto estas rajto? - ĉies rajto paroli sian lingvon, kompanse de ĉies devo paroli la lingvon de la socio?

Tial esperanto, konkludas Lo Jacomo, ne devas submetiĝi al limiga leĝigado, sed konsideriĝi individua rajto paroli elektitan lingvon: devas esti permesite ĝin lerni al tiuj, kiu serĉas kulturen riĉigon pro kultura varieco. Ĉu la esperantistoj pretas ekagi je tiu ĉi defio?

Dum la vigla debato, kiu sekvis ĝis noktomezo partoprenis esperantistoj de la tuluza kaj bordoza regionoj, kaj okcitanistoj, kiel Guiu Sengeges, prezidanto de Institut d'Etudis Occitans de Nauta Garona; Jan Vilotte, sekretario de Partit Occitan; kaj Jacme Taupiac, profesoro de la okcitan lingvo ĉe la Katolika Instituto de Tolosa.

EKC (Tolosa)

## Esperanto-kulturo eksteresperantie



Ne estas pli efika maniero levi la socian renomon de esperanto, ol montri, ke esperantistoj, laŭ la vortumo de Raŭma Manifesto, ja povas "diri ion". Tio eblas diskonigante atingojn de la esperanto-kulturo ekster la esperantista medio, i.a. tradukante la originalajn verkojn etnolingven. Ju pli popularas la ĝenro de la verko, des pli grandas la propaganda efiko. Kaj unu el la plej popularaj ĝenroj estas sciencfikcio. Krome, legantoj de sciencfikcia literaturo estas pli liberaj mense, ol kiu ajn, kaj ili pli facile povas akcepti ideon de la internacia lingvo.

Tiel, verŝajne, pensis la italaj esperantistoj, kiam ili preparis la itallingvan eldonon de sciencfikcia rakontaro, originale verkita en esperanto *La lingua fantastica*. La altkvalitan eldonon (bela papero kaj komposto, bonaj ilustraĵoj, faritaj speciale por ĝi) efektivigis eldonejo Keltia Editrice. La antaŭparolon verkis Harry Harrison, ne nur mondfama sciencfikcia verkisto, sed ankaŭ esperantisto kaj aŭtoro de unu originala rakonto prezentita en la libro. En la kolekto troviĝas rakontoj de Liven Dek, István Nemere, Bernard Golden, Pekka Virtanen, Konisi Gaku, Mihail Korotkov, William Auld kaj pluraj aliaj esperantaj verkistoj. La fontoj estis almanakoj Sferoj, esperantaj periodaĵoj, kolektivaj kaj aŭtoraj kolektoj por la prezentata ĝenro.

Espereble, la libro havos sukceson inter la italaj legantoj kaj allogos al nia lingvo novajn adeptojn (ko-

mence kaj fine de la libro oni povas trovi adreson de Itala Esperanto-Federacio). Por alilandaj esperantistoj ĝi povas servi kiel bona modelo, kiel oni propagandu esperanton per valoroj de nia kulturo.

Nikolao Gudskov  
(Eventoj)

## Esperanto-rubriko

"Esperanto estas nek laŭdenda nek defendenda... sed utiligenda!" - tiel startas la esperant-lingva rubriko en la maja *Union Pacifiste*, monata revuo de la Franca Pacisma Unuiĝo. La rubriko ĉerpas tekstojn el *SAT-Amikaro* kaj aperas ĉiunumere.

(Esperanto)

## Kontraŭ blufoj

La dekan fojon TEJO petis, ke KEJ traduku en la katalunan ĝian flugfolion. Delonge ĝi aperis en ŝajne dudeko da lingvoj kaj, flate dirite de TEJO, nur mankis la kataluna el la "gravaj" eŭropaj lingvoj. Bedaŭrinde ĉi-foje ni ne povis denove rifuzi la mendon, ĉar oni trovis en Germanio homon, kiu produktis krudan katalunan version, tiel ke eblis nur lingve poluri la tekston (pliajn modifojn oni eksplicite malpermesis).

Nu, kial ni tiel forte kontraŭstaras ĝin? Evidente ĝi estas pli lerte farita ol aliaj similaj varbiloj, sed ĝi plu enhavas esencajn mensogojn, kiujn ne licas disvastigi.

La fakto, ke esperanto estas principe la plej simpla lingvo estas ekster ĉies dubo, almenaŭ kompare kun la naciaj, sed tio, ke ĝi estas la lingvo plej facile lernebla (kaj eĉ 10-

foje pli ol ĉiu ajn alia, kiel TEJO asertas) estas enorme disvastigita blufado inter la esperantistaro. Bedaŭrinde tio estas tiel dubinda kiel tiuj televidaj reklamaĵoj pri la plej blankiga lesivo. Fakto estas, ke pluraj lingvoj havas multoble pli evoluintajn lernilojn kaj bonege trejnitajn profesiajn instruistojn, kiuj permesas multe pli rapidan lernadon. Aliflanke, ekzistas sociaj kondiĉoj, kiuj faciligas kontakton kun la lernita fremda lingvo: foje eblas spekti ĉe si televidon en ĝi (per satelito aŭ tra originalaj aŭ dualaj filmoj) aŭ simple eblas loĝi en lando, kie la koncerna lingvo estas uzata. Malhelpo por multaj estas mono, sed per iom da mono esperanto ne nepre estas la plej simple lernebla lingvo.

La varbilo enhavas pliajn mensogetojn, kiel la ekzisto de "multaj" universitataj esperanto-katedroj. Aliflanke facilas partopreni en renkontigoj, teni korespondadon aŭ senpage gastigi ĉe eksterlandanoj per la faktaj mondolingvoj: oni nombras miloble pli da kunvenoj en ili ol en esperanto; kaj ne nur ĉe ni troveblas rubriko *Deziras korespondi* aŭ reto simila al Pasporta Servo. Krome la fakto, ke en centoj da lingvoj ekzistas literaturo, revuoj, muziko kaj radielsendoj, estas evidenta al ĉiuj. Iam la katalun-andaluzan satiran revuon *Ĉiesrevujino* sarkasme "tradukis" tian flugfolion por varbi al la angla: mirinde preskaŭ ĉiuj argumentoj perfekte sidis ankaŭ por ĝi.

Per ĉio ĉi evidente mi ne (nepre) celas diri, ke esperanto estas tiel sencela ŝatokupo kiel kolekti kaktusojn, sed mirindas, ke TEJO trovis nur tiujn mensogajn kaj ridindajn argumentojn por diskonigi esperanton. Kaj des pli bedaŭrinde estas, ke ĝi fierege altrudas sian flugfolion. Komprenneble, ne KEJ disvastigos ĝin.

Hektor Alos i Font

# FREQÜÈNCIES

REVISTA DE LLENÇÜES I POBLES

## Nuevo método de esperanto

Endas varme saluti la duan eldonon de la plej bona esperanto-lernolibro por hispanlingvanoj de post ĝia publikigo en 1982. Jam de pluraj jaroj mi konstatas, ke homoj, kiuj sukcesas enkapigi -kaj alproprigi- la enhavon de *Nuevo método de esperanto* iĝas preskaŭ aŭtomate bonaj parolantoj. Apenaŭ eblus diri same pri aliaj lernolibroj en la hispana, kiuj ne ĉiam montriĝas taŭgaj gvidiloj por niaj komencantoj. Nuntempe ni disponas ĉirkaŭ 15 lernolibrojn en la hispana (se oni enkalkulas la perkorrespondajn kursojn), kaj la sola vere rekomendinda el ili, krom *Nuevo método de esperanto*, estas la eksmodeta *¿Sabe usted esperanto?* de la argentinano Jorge Hess. Tiu ĉi verko ŝajnas unuaŝtupa kaj iom tro simpla kompare kun la duaŝtupa kaj plena instru-libro de Fernando de Diego.

Escepte de la supermezure kosta *Esperanto: un mundo, una lengua* de Jorge Luis Santos Morales, ĉiuj aliaj lernolibroj por hispanlingvanoj suferas fortajn mankojn. Mi pravigu tiun opinion: kelkaj simple estas krude malbonaj, ĉar ilin verkis malrespondecaj nekompetentuloj ŝatantaj gramatikumadi; aliaj eksmodiĝis, ĉar ili aliras gramatikon de teorioj pasintjarcentaj; triaj pli-mapli bone elturniĝas, ĝis ili pritraktas la malfacilaĵojn de esperanto por la parolantoj de la hispana, t.e., utiligo kaj utileco de la akuzativo, vortkunmetado, prepozicioj kaj prononco de la esperantaj konsonantoj.

Tre felice, la libro de Fernando de Diego kompensas la paŭperecon en la hispana panoramo de esperanto-instruiloj. Tiu verko senkomplekse aliras gramatikon kaj regule donas helajn klarigojn pri ties tiklaj kaj maltiklaj eroj (vd. la indokson aperontan en *Boletín de la Federación Española de Esperanto*). Krome, aldoniĝas proverboj kaj sukaj fiksjaj esprimoj, interpunkcio en esperanto, listo de "falsaj amikoj", elementoj de esperanta metriko (kun bonegaj ekzemploj), rekomendita literaturo por plua studado kaj informoj pri Esperantujo (kongresoj, delegitoj, historio, litera-

turo) kaj organizaĵoj en la mondo kaj en hispanlingvio. Fine de la libro aperas ekzercar-ŝlosilo por memlernantoj.

Ĉu io malbone sidas meze de tiom da bonaĵoj? Nu, jes: la titolo, *Nuevo método de esperanto*, estas misgvida pro du kialoj. Unue, tiu verko ja ne estas vera lernolibro: temas fakte pri ekstara **gramatiko** de esperanto adaptita al la bezonoj de la hispanlingva publiko. Due: ĝi ne celas verajn komencantojn, sed progresintojn kun ioma scipovo de esperanto, kaj nur eventuale memlernantojn kun tre-tre forta volo lerni. Tiu karaktero havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn: la libro ja kapablas respondi detale kaj plene la plej har-fendajn gramatikajn demandojn de entuziasma progresinto; tamen, ĝi bezonus tri-kvar pliajn ĉapitrojn en la komenco por plifaciligi la eklernon al la veraj komencantoj.

Pli: la dek dialogoj, kiuj garnas la libron ("*El esperanto en diez diálogos*") fakte superfluas. Mi konas plurajn homojn, kiuj lernis esperanton per tiu ĉi libro kaj, laŭ mia scio, mi estas la sola, kiu legis la dialogojn; ja ĉiuj aliaj prifajfis ilin, eble prave.

Ankoraŭ lasta afero, fakte la sola vere kritikinda en *Nuevo método de esperanto*: la aŭtoro nur supraĵe pritraktas la plej komplikan esperantan gramatikajn por hispanlingvanoj, nome, la vortkunmetadon. Oni vere devus pliampleksigi tiun ĉapitron por la tria eldono. Tiu makuleto tamen ne demetas eĉ gramon da valoro de tiu ĉi juvelo.

Resume: *Nuevo método de esperanto* estas larĝe la plej bona esperanto-gramatiko en la hispana kaj ĝi montriĝas en la praktiko paŝo preskaŭ deviga por ĉiu hispanlingvano deziranta funde lerni la internacian.

Antonio Valén


- Fernando de Diego, *Nuevo método de esperanto para clases y autodidactas*, Venaria (Torino), Heroldo de Esperanto, 1993 (2a eld.), 215 p.

## Atentinda eldonejo

La kalifornia eldonejo Bero estas unu el la atentindaj libro-produktejoj de nia komunumo. Ja ne temas pri tio, ke ĝi eldonas grandan kvankton da verkoj: fakte ne, kaj eĉ ofte la aperantaj volumoj ne atingas 60 paĝojn. Tamen atentindas la bone zorgitaj volumoj, adekvata prezo kaj, eĉ pli, solida enhavo. Verdire, nova generacio sin prezentas tie. Georgo Kamaĉo, la plej juna membro de la Akademio, plurjara akaparanto de premioj en la Belartaj Konkursoj de UEA kaj pasintjara laŭreato en la Internaciaj Floraj Ludoj, tie prezentis sian unuan memstaran volumon *Sur la linio* (1991). Kurte-resume, temas pri eksperimenta rakontaro, kiu rangas inter la plej bonaj ĉi-ĝenraj verkoj de nia literaturo. Alia iberiano, Gonçalo Neves, kiu kunaŭtoras i.a. kun Kamaĉo la gravan poemaron *Ibere libere* (1993), aperigis pasintjare sian bonegan *Kompreni*, kie li prezentas - en plipoluritaj versioj- plurajn verkojn premiitajn en la IFL: vere leginda juvelo!

La marko ne prezentas nur originalojn. István Ertl, samgeneraciano de la du antaŭaj aŭtoroj kaj kiel ili premiita en IFL, anoncas sian tradukon de selekto el la *Unuminutaj noveloj* de István Örkény, kiuj iom memorigas nian Calders, laŭ plaĉa specimeno ĵus aperinta en la revigliginta literaturo revuo *Fonto*. Fine, ni menci, ke la plene rekomendindan *4\*(4\*4) rumanaj poetoj* (1990) en elstara traduko de Ionel Onet, same ofta kunlaboranto de *Fonto*, kiu prezentas kvar junajn nuntempajn verkistojn el Drakulio.

Hektor Alos i Font



## Una nova antologia catalana en esperanto?

□ (LITERATURA FOIRO)

L'escriptor i traductor catalanoportuguès Manuel de Seabra ha estat encarregat de dur a terme dues antologies de textos en prosa de l'última dècada: una esperantista (en català) i l'altra catalana (en esperanto). El projecte és una col·laboració entre els PEN Clubs català i esperantista.

## Metro Zamenhof

Sembla ja confirmat que la nova línia 2 del metro de Barcelona tindrà una estació amb el nom Doctor Zamenhof prop del carrer dedicat a l'iniciador de l'esperanto. Si fos així, Barcelona seria la primera ciutat amb una estació de metro dedicada a la llengua internacional.

## "Feliĉan paskon en kristo resurektinta!"

□ CARLO SARANDREA (L'ESPERANTO)

Aquestes són les paraules que va dir el papa Joan-Pau 2n quan va utilitzar per primer cop l'esperanto des de la plaça de Sant Pere. Sí, per primer cop des d'aquesta plaça, perquè ja l'havia fet servir dues vegades el 1990 davant d'una multitud de joves que es van aplegar amb ell a Czestochowa. A més de les dotzenes de llengües en les què, com se sap, el papa es dirigeix abans de la benedicció *Urbi et orbi*, enguany també va ser-hi la llengua internacional: era el diumenge de pasqua de 1994, als volts de les 12 hores i 25 minuts. Els mots en esperanto van ser cap al final, abans del polonès i del llatí.

## Tolkien esperantista

□ (ESPERANTOUSA/ESPERANTO)

"Aconsello, a tots els que tenen temps o ganes, de dedicar-se al moviment per a la llengua internacional: doneu suport amb lleialtat a l'esperanto" - recomanava el 1932 J.R.R. Tolkien (1892-1973), l'autor de *El senyor dels anells*, *El hòbit* i altres famosíssimes obres. Ell mateix va aprendre l'esperanto cap al 1907 i "en aquell temps el llegia força".

## L'ona ha mort

S'ha sabut que l'últim parlant que mantenia viva la llengua ona, a la Terra del Foc, va morir el 1989. La desaparició de llengües no és un fenomen necessàriament allunyat de les nostres fronteres: l'aragonès, llengua cooficial a la Corona d'Aragó, és mantingut només per uns 30.000 parlants. Només a Europa i en el grup fino-úgric, el livó tenia 150 parlants a Letònia i Curlàndia el 1970, la llengua ingra, prop de Sant Petersburg, en comptava 382 el 1959, i segons les últimes dades conegudes, només 10 persones encara parlen el vàgia, a la mateixa regió.

## La constitució colombiana en set llengües

□ (EL PAÍS)

Colòmbia, amb 36 milions d'habitants, és un dels països d'Amèrica amb una major riquesa lingüística: s'hi parlen 66 llengües de 12 famílies diferents. La Constitució colombiana reconeix aquesta diversitat ètnica i el pluralisme cultural de l'estat i ha estat traduïda a set llengües indígenes: wayunaiki, nasa yuwe, guambià, arhuac, camentsa, inga i kube. Per aquesta tasca ha calgut l'esforç de traduir conceptes de la civilització euro-

pea a termes propis de les diferents cultures indígenes. Així, per exemple, en kube "constitució" s'ha adaptat com "arbre d'aliment per a la vida", després d'un any i mig de treball en comú d'un lingüista aborigen i un advocat que van arribar a aplegar tot el poble, dels ancians i els mestres fins als nens, per discutir els termes. En total s'han editat 8.000 llibrets, il·lustrats amb dibuixos al·lusius a la mitologia i cosmogonia de cada comunitat, així com 1.300 cassettes amb la versió oral.

## Pel tamarzight

□ (EL PAÍS)

Una vaga de mestres ha paralitzat la vida escolar a Cabília (Algèria). El motiu és la defensa de la llengua tamarzight (mal anomenada *berber*), parlada per un terç de la població argelina. Els vaguistes en demanen la introducció a les escoles i universitats i l'aprovació d'una esmena constitucional que l'oficialitzi al mateix nivell que l'àrab. La vaga ha deixat sense escola mig milió de nens, alhora que han tancat tots els comerços de la capital de la regió, Tizirt. [Ha aparegut un interessantíssim article sobre aquesta llengua en l'últim número de la sempre recomenable revista *Etnismo*.]

D'altra banda, el Front Islàmic de Salvació manté la campanya d'atemptats contra l'ensenyament del francès a les escoles.

## Convalidacions

□ (EL TEMPS)

La Generalitat Valenciana ha aprovat un decret pel qual es convaliden tots els títols oficials de català pels equivalents de "valencià" vigents a la comunitat autònoma. La Generalitat de Catalunya i el Govern Balear ja tenen decrets semblants.